

HABIS

JUNULARA SEKCIO DE HISPANA ESPERANTO-FEDERACIO

REDAKTORINO:
F-INO ITZIAR ARTECHE

Nro. 83 - 1973

Str. Barrencalle Barrena, 7 - 1.^a
Telefono 24 44 29 - BILBAO-5



JUNAJ RENKONTIGANOJ EN LA ESPERANTA STANDO DE LA
INTERNACIA SPECIMEN-FOIRO DE BILBAO





EN HAVO

Notoj	1	
El barcelono	2	- 3
Konkurso Simondetti	3	
Vª Franca-Hispana Renk.	4	
La kongreso de Madrido.	5	- 6
Jun. Renk. Monistrol	7	- 8
29ª I. J. K.	9	-10
58ª U. K.	11	-12

NOTO

HISPANE-HISPANE-HISPANE-HISPANE-HISPANE-HISPANE-HISP

---De ahora en adelante, vistos los conocimientos de algunos HEJS-anos, las notas más importantes se publicarán en castellano.

---En la lastaj revuoj aperis kelkaj eraroj kiujn, pro manko da tempo, ni ne korektigis. Ni pardonpetas pro la malbono kiun tio povis kaŭzi al lernantoj.

---Nia revuo tro pritraktas Bilbao'n. Tio okazas ĉar ni ne ricevas viajn novaĵojn pri eventoj en viaj urboj. Tial ni nur povas agi urbskale. REMEMORU KE HEJS ESTAS ANKAU VI. DO, SENDU ARTIKOLOJN PRO NIA REVUO.

---Studenta Pola Asocio petas al ni kunlaboron. Do, ni petas al ĉiuj altlernejaj studentoj sciigi sian nomon, por vidi ĉu ni iel povos kunlabori.



el **BARCELONO**

La unuan semajnon de ĉijara julio vizitis Barcelonon samideano Giorgio Silfer, akompanata de sia as instantino Vanna Guernieri.

Giorgio Silfer -arta nomo de Valerio Ari- estas eksperto pri socilingvistikaj problemoj, esperanto-instruisto kaj internacia prelegisto. Ĉefe, li estas konata en Esperantio pro siaj beletraĵ verkoj kaj pro sia laboro kiel ĉefredaktoro de la literatura revuo "LITERATURA FOIRO" (1).

La "Grupo de Esperanto Sabadell", "Club de Amigos de la UNESCO" kaj "Stelo de Paco" en Barcelono, kaj la Esperanto-Fako de "Centro Excursionista Puigcastellar" en Santa Coloma de Gramanet invitis lin prelegi en siaj respektivaj societoj.

Okaze de tio, la "Klubo Amikoj de UNESKO", kunla bore kun sia Esperanto-Fako, aranĝis publikan debaton en la internacia lingvo kun sekvanta traduko en la katalunan pri la temo "Esperanto kiel lingva kaj socie movado". Amaso de ĉeestantoj -precipe gejunuloj- atente sekvis la paroladon de Giorgio Silfer.

La preleganto skizis la ĉefajn trajtojn de la Esperanto-komunumo, ĝian historion, evoluon, internajn fortojn kaj nunajn tendencojn. Li emfaze ankaŭ atentigis la publikon pri la kunlaborado kaj identigo de UEA kaj UNESKO en la similaj celoj.

En la aliaj societoj li prelegis pri "Itala folkloro". En "Stelo de Paco" la danca stabo "Esbart Comtal", post la prelego, prezentis al la publiko kaj honore al la preleganto aron da tipe katalunaj folkloraj dancoj kaj kantoj.

En ĉiuj okazoj iĝis karakteriza la amasa parto preno de ne esperanto-parolantoj kaj de reprezentano

sekvanta tradukservo povis sekvi la prelegojn.

Je la fino de ĉiuj disertacioj Giorgio Silfer prezentis al la ĉeestantoj siajn du lastajn verkojn: "DROLE KAJ PETOLE" (2) kaj "DOKTORO ROSALES" (3). Ĉi lasta teatraĵo estos enpremiere ludata okaze de la 29-a TLJO-Kongreso en Sarajevo.

ATJKUS BUKIŠ

(1) LITERATURA FOIRO. dumonata; eld. literatura rondo "LA PATROLO", via Pantano 17, I-20122 MILANO. ITALIAO

(2) DROLE KAJ PETOLE. Giorgio Silfer. 1972. Milano 18 p. ilustr. 25 cm. Originalaj anekdotoj.

(3) DOKTORO ROSALES. Giorgio Silfer. 1973. Milano 24 p. ilustr. 25 cm. Originala teatraĵo.

LITERATURA FOIRO

Kultura gazeto
via Pantano, 17
20122 Milano I

Peranto en Hispanio:

Juan-Ramón Guiñón. Wifredo n-ro 6, 3^o 2^a. Barcelona-1
Bankonto n-ro 4-4986. Banko de Santander. Rambla de
Cataluña, 114. Barcelona-8

Abonoj (nur tutjaraj) - por Hispanio = 150 pesetoj
alilande 15 rpk aŭ egalvaloro

KONKURSO SIMONDETTI 1974

La Ornitologia Rondo Esperantlingva (ORE) aljuĝas sian Premion Simondetti, de 1000 BF (aŭ egalvaloro en libroj) al elstara artikolo, originala aŭ tradukita, pri la tre ĝenerala temo "Naturo".

Ĉiuj partoprenantaj artikoloj aperas konforme al la regularo en "La Nevo", organo de ORE, kaj rajtas pritrakti tiun ajn best(ar)on aŭ plant(ar)on. Kandidatoj por la konkurso 1974 bonvolu peti la regularon al la sekretario M. Halvelik, Blommestraat 41, B-2200 Borgerhout, Belgio.

Gi bone sukcesis. La partoprenantoj estis sufiĉe multaj. Multnombra grupo de zaragozanoj venis en aŭtobuso luita de ili. La francaj samideanoj estis proksimume 15, kaj ankaŭ ĉeestis aliaj el Valencio, Santandero, ktp.

Kiel anoncite, la 29^an de Junio, je la 7^a - okazis la akcepto de la partoprenantoj en la Bilbao'a Grupo. La anoncita teatra prezentado, pro neebleco de unu el la aktorinoj, ne okazis, sed ĝi estis bone anstataŭata per amuziga prezentado de la grupa sekretario, fana puldresisto, kaj modeldona - muzika ludado de Sro. Leoncio García. Tuj poste, lunĉo regalita de la Bilbao'a Grupo, feliĉe finigis la unuan renkontiĝan tagon.

La 30^an matene, pluraj samideanoj partoprenis sangodonadon, montrante la homan sindonemon de la esperantistaro. Sammatene, la Bilbao'a Urboĉambro malavare regalas niajn samideanojn per luksa lunĉo. Jam vespere, ĉiuj eniris la Historian Muzeon de Vizcaya, ege interesa por la kono de praaĵ kaj pli modernaj tempoj en la vaska regiono. La posta vizito al la esperanta stando de la Internacia Specimenfojro de Bilbao, unafaje atingita, altiris la atenton de multaj neesperantistaj ĉeestantoj.

Jam, la 1^an de Julio, la ekskurso tra turisme interesaj lokoj, estis ege sukcesa kaj gaja, pro la gojemo de la gejunuloj, ne nur de Bilbao, sed ankaŭ el Zaragoza kaj Alcañiz. Notinde estas la miriĝon kaŭzita de la famaj grotoj de Santimamiñe, bela ĝa subtera pejzaĝo.

La ekskurso finis per tagmanĝo en Guernica, sekvata de gaja kantado kaj dancado en familia etoso. Malfeliĉe, la tempo pasis, kaj estiĝis horo por adiaŭo. Dise iris aŭtobusoj kaj aŭtomobiloj, ĉiuj projektante ĉeeston al la venontjara VI^a Renkontiĝo, ie okazonta en Francujo.

la kongreso de madrido



De la 20^a ĝis la 24^a de julio, okazis en Madrido strange kongreso, kiu estis nomata "XXXIII^a Necia Kongreso de Esperanto". Mi diras ke ĝi estis strange kongreso ĉar la plimulto el la kongresanoj ne sciis kio estas la tiel nomata "Esperanto".

Se oni demandus la ĉeestintojn kio estas Esperanto, mi pensas ke preskaŭ ĉiuj respondus ke ĝi estas strange triokula kankro, kiu, male al aliaj samspecaj bestoj, ires antaŭen. Ankaŭ aliaj respondus ke Esperanto estas freneza hobio de familiano (edzo aŭ petro). Tamen, kelkaj certe sciis ke Esperanto estas la plej taŭga internacia lingvo.

Tion mi diras precipe rilate la ĉeestintajn gejunulojn, kiuj, pro la okazigo de la kongreso en la malloga Madrido (malloga dum somero), kaj, precipe, pro la fakto de la samtempa okazigo de la multe pli interesa kaj esperanta Internacia Junulara Kongreso (21-27 julio) en Sarajevo, estis malmulte ĝaj. Ankaŭ pro tio mi pensas ke ne kongresis Esperantoj, partoprenante la IJK-on, kaj nur ĉeestis la krokodiluloj. Estos ende en estontaj kongresoj forigi tian koincidon.

Do, laŭ vi jam rimarkis, la esperanta nivelo estis surtere, kvankam, pro la ĉeesto de ĉarma polsinino, Fino. Michalina Prus, nepre esperante alparolebla, la krokodiluloj klopodis babiloti.

Laŭ estis petita de ni, la junulara tago estis la unua de la kongreso, por faciligi la interkonon de la gejunuloj. Matene, je la 12^a proksimume, Sro. Otto Prytz, profesoro de la Osloa Universitato, klare kaj klare esperante prelegis pri la gravaj temoj rilatantaj polucion, malpurigon de aero kaj akvo, ktp., kaj poste estis malfermata interparolo por interŝanĝo de opinioj. Vespere, je la 6^a, okazis la HEJS-laborkunveno, kie la prezidanto, kiel ĉiam, plendis pro la nehelpemo de la membroj, kaj parolis pri la agado de nia sekcio kaj la projektoj por venontaj tempoj. La projektojn kaj sugestojn mi sekve rakontos:

Unue, estis decidata la okazigo de HEJS-kunveno en tendaro proksima al Zaragoza, profitante iun ponton inter festaj tagoj.

Due, proponite de la delegitoj de la grupoj, la plej agema junul(in)o el ĉiu grupo estos subvenciata de ĝi por ĉeesti tiun kunvenon.

Trie, ankaŭ oni decidis organizi regionajn HEJS-kunvenojn, dum semajnfinoj, por interŝanĝo de opinioj kaj labormetodoj. Povos esti profitataj lokaj festoj.

Ĉi tiuj ideoj estas la kreado de HEJS-grupoj, idoj de la E-grupoj (el ĉi tiu pago ni kuraĝigas vin tion ek-egi), kaj la propono por pli efika kunlaborado kun aliaj E-organizoj. Ĉi tio lasta estas serioze studata por estonta agado.

Mi devas gaje sciigi ke kelkaj belaj Vigo'anoj venis vestantaj propagandan HEJS-ĉemizon, rigardinda kaj strangmiene rigardata de neesperantistoj.

Fine, nokte, okazis la junulara balo kaj elekto de "Fraŭlino Esperanto", kiu estis la bela kaj ĉarma valenciano Fino. M^o Carmen Herrero. Rimarkinda estas ke ĉi tiu elekto, parto de la dancado, kaj la oficiala malfermo, estis televide raportataj.

Priparolindaj estas la prelegoj de Sro. Darío Rodríguez López de Silva, bonega E-parolanto, pri la temo "Lingva ĥaoso, bremsa por la progreso", kiu aldonis interesajn ideojn por la enkonduko de Esperanto al la Eŭropa Ekonomia Komunumo, kaj la bedaŭrinde hispane prelegite-kvankam modeldona-parolado de Sro. Otto Prytz pri la temo "Utileco de Esperanto por lernado de ĉiu lingvo".

Menciindaj estas la nokte ekskurso tra Madrido, kiu finis en la amuzej-parko, kaj la turisme kaj historie interesa ekskurso al Segovia kaj La Granja.

Ni esprimu almenaŭ unu plendon: la oficiala bankedo, pro la troa kosto, 500 ptoj, malebligis la ĉeeston de multaj junaj kongresanoj. Estos nepre malpliigi la koston de la bankedoj en la venontaj jaroj.

HEJS, montrante malevarecon, regalis la gejunulojn per kelkaj manĝetoj. Ni esperas ke same okazos en venontaj kongresoj aŭ en la HEJS-renkontigo.


Malgraŭ la surtera nivelo de E-kapableco, nova verbo estis elpensata. Ĝi pliriĉigos la E-vorttrezoron. Ĝi estas la verbo "glengli", kiu estas daŭre praktikata en la venonta HEJS-renkontigo por ĝin prezenti en la proksima IJK okazonta en Germanujo, el kiu ĉiuj projektas ĉeesti, bone regante la lingvon (almenaŭ, ĉiuj promesis tion).

Estas menciinda la vigleco de la Vigo'a Grupo, kiu veturis al Madrido en aŭtobuso luita de ĝi. Tia vigleco estus dezirinda en ĉiuj E-grupoj.


La venontjara kongresurbo ne estis certe decidata. La decido estas inter Burgos kaj Valladolid, kiuj certe ege estas pli allogaj ol Madrido.

Kompreneble, la gejunuloj gaje kunvivadis, kaj, pro tio, la lito estis maldaŭre vizitata loko.

Do, ni de nun rendezvas vin por la venonta (kaj nur esperantlingva) HEJS-renkontigo. Vi estos ofte kaj amplekse informataj pri tiu evento en la venontaj bultenoj.



JUNULARA RENKONTIĜO MONISTROL de MONTSERRAT




La 16-an kaj 17-an de junio okazis en HEJS-restadejo en Monistrol de Montserrat junulara renkontiĝo. Ĉefaj ecoj de ĉi kunveno estis la amasa partopreno de gejunuloj-tridekel la tuta barcelona provinco, kaj ilia sufiĉe bona lingva nivelo.

Sabate, jam alvenis la plejparto de la partoprenantaro. kelkaj el ili kunportis siajn tendojn (vidu 1 kaj 2). Danke al la varmeta kaj milda nokta vetero preskaŭ ĉiuj bivaĝis (+).

Post la noktomanĝo okazis la interkonatiĝa vespero laŭ la GEJ-a metodo,

kiu -laŭdire- estis gaja. Sabadell-a kuko (ĝin pri zorgis Johana Hernandez) kaj drinkaĵo "BERVALC" (ĉefverko de Petro Nuez) helpis krei la bezonatan etoson.

Dum la kampadeja fajrego oni okazigis laborgrupon pri la temo "juna kaj maljuna generacioj". Diversaj kaj ege interesaj opinioj aŭdiĝis en ĝi. Ankaŭ oni kantis, rakontis spritaĵojn kaj skeĉojn, ludis... Rimarkinda estis la gajeco kaj humuro de la sabadell-anoj. El ili elstaris Johano Ramoneda, kiu gitare kreis la muzikan etoson.





3

La dimanĉa programo enhavis ekskurson al sovaĝa, enmonta kaj ne polucigita fonto (vidu 3). En ĝiaj ĉirkaŭaĵoj kelkaj laŭsis sin foti por la estonteco (vidu 4). Tagmeze, la anaro manĝis en gaje juna kaj "sangria-a" (++) atmo

sfero (vidu 5). Posttagmeze -laŭvole- oni babildis, kantis, promenis al la belaj ĉirkaŭaĵoj, ludis tenismatĉon, ktp. Je la sunsubiro, post la reciprokaj adiaŭoj, ĉiuj foriris hejmen laŭ la sama alvenvojo.

La ĉeestantoj esprimis la deziron daŭre organizi tiajn eventojn -kiuj



4

ebligas junan etoson, reciprokajn interkonatiĝojn kaj viglan praktikadon de la internacia lingvo.

La organiza komitato varme dankas ĉiujn aktivulojn, kiuj pere de siaj konsiloj kaj helpo ebligis la renkontiĝon.



5

Atjkus Bukiŝ

(+) Bivaki= Sentende ripozi sur kamparo.

(++) Sangria= Tipe hispana refreŝiga trinkaĵo el ruĝa vino, fruktoj, sukero kaj glacio. Antaŭ la trinkado oni kirlas la tuton.

8



Tial ke ĉitium junulara kongreso estas por ni la unua I.J.K. kiun ni ĉeestas, ni ne povas kompari ĝin al la aliaj. Laŭ mia vidpunkto, kvankam estis - etaj mankoj, la 29^a I.J.K. (Internacia Junulara Kongreso) kiu ĉi-jare okazis en Sarajevo, bone sukcesis. La temo kiun tie ni pritraktis "Junularo kaj hommedio" estis vere interesa malgraŭ ke iu grupgvidanto ne sciis superregi sian fakon. Oni povis rimarki ke li estis nesciulo pri la temo kiun li gvidis.

Dum la Kongreso ni loĝis en la hotelo INDEKS, ĝi estas moderna konstruaĵo staranta en la antaŭurbo Nedžarići (Neĝarići). En tiu hotelo okazis labora parto de la Kongreso.

La unuan Kongrestagon vespere estis projekciado de filmoj de Unuiĝintaj Nacioj dediĉitaj al problemoj de la hommedio. Ili estis vere gravaj filmoj, tamen la klarigoj estis en nekomprenbla esperanto.

Duan tagon, malfermo de la Kongreso (iomete peza). Je la intermezo kaj la fino de la malfermo - kantis Ĉeĥoslovaka muzikgrupo "Kvarteto Esperanto", vespere ni ĉeestis teatron, kie aktoris DRAMA GRUPO DE ESPERANTO KLUBO EL ZAGREB .

Trian tagon, urbo-vizitado. Kiel imponaj simboloj de la nuntempa kaj tiama Sarajevo sur la areo de kelkmil kvadrataj metroj kunekzistas kvar centraj preĝejoj de kvar malsamaj religioj Ankaŭ hodiaŭ teatra vespero.

Kvara tago matene en grupoj de proksimume 20 personoj oni vizitis dekon de plej gravaj entreprenoj, kaj oni interparolis kun iliaj laboristoj . Vespere en la somera ĝardeno de la hotelo Bristol ni ĝuis mirindajn dancojn kaj kantojn de la popoloj de Jugoslavio.

La kvinan tagon, ni ekskursis al kelkaj urboj el Jugoslavio. Ni havis la sorton viziti Jajce. Ĝi - troviĝas inter du riveroj - Pliva kaj Urbas kun belegaj akvofaloj. La urbon oni loĝigis ankoraŭ en la antika periodo. La slavan nomon Jajce (ovo) ĝi ricevis verŝajne pro la ovoforma karsta ŝtono sur kiu ĝi estas konstruita. Altiris mian atenton ke la kampara - noj en tiu ĉi urbo vestis per nacia kostumo.

Ĉitie ankaŭ ni vizitis entreprenon "Elektrobos ma" kaj ili donacis al ni per abunda kaj bongusta tag mango.

Sesan tagon, okazis Oficiala Akcepto ĉe la Pro tektanto kaj poste distra renkontiĝo kun la junularo de Sarajevo, ĉitie amuzis nin nia muzikgrupo "Kvarte to Esperanto".

Kaj jam la sepan tagon estis kune resumaj sesioj kaj fermo de la kongreso. Ni adiaŭis la urbon kaj multaj el ni pretis niajn valizojn kaj ekvojaĝis kune al BEOGRADO.

MARIA

AVIZO PRI

INTERNACIA ESPERANTO+INSTITUTO

La Internacia E-Instituto ĵus revigliĝis. La libro-servo kaj aliaj okupoj denove funkcias normale. Ĝis nun, pro manko de laborantoj, multaj leteroj, fakturoj, mendoj, k. t. p., ne ricevis respondon. Se vi ion petis au ŝuldas al la Instituto, informu al ĝi pri tio.

La adreso restas la sama:

Riouwstraat 172, Hago-Nederlando.

Telefonoj: 070-556677 kaj 070-669353.



La 58^a Universala Kongreso de Esperanto, prezentis similajn trajtojn kiel la antaŭaj. Paroli pri ĝi ne estas tre facila.

De la vidpunkto de kongresanino kiu kvarfoje partoprenis Universalan Kongreson, tiu ĉi lasta Kongreso post lasos rememoroj ne tre gajajn. Kaj nun ion pri la Kongresa disvolvigo.

Post montri nian konfirmilon al la kasisto li stampis sur la kongresa karto "kontrolita" kaj ni ricevis ĉe la ĝiĉeto dosierujon enhavante la dokumentojn.

La unuan kongrestagon sur la stratoj proksimaj al la kongresejo estis videbla granda alfluo de kongresistoj portante plurkolorajn dosierujojn. Sabaton 28^{an} de Julio okazis la Interkonatiĝa Vespero en la restoracio London, bedaŭrinde la loko ne estis sufiĉe ampleksa por ni ĉiuj, pro tio post intersanĝi salutojn kaj vesperman ĝi kun samideaninoj de Bulgarujo ni eliris por lasi la lokon al la aliaj kiuj staris atendante.

Dimanĉon je la deka okazis la Inaŭguro ĉe estis diversaj aŭtoritatuloj. Estis rimarkinda la ne ĉeesto de Dr. Ivo Lapenna. La alfluo estis tre multenombra. Je la dekkvina okazis Diservo en malgrandeta preĝejo, kelkaj pastroj de diverslandoj kuncelebris la meson en esperanta lingvo. La preĝejo estis plena.

La Jugoslavia vespero montris al ni interesajn poldancojn kaj kantojn. En la oficiala balo en varma etoso, ŝajnis ke la plenaĝaj homoj bone interkompreniĝis kun la viglaj koroj de la junulinoj. Rilate al tiu ĉi afero estis rimarkinda en la halo de la kongresejo multaj geparoj li plenaĝa kaj ŝi tre juna. Dum tiu ĉi kongreso estis palpebla ĉi tia cirkonstanco.

Gena afero estis la loĝejo. Ni havis pagita nian restadon en Studenta Domo kaj ĉiom aranĝis pere de la loĝiga servo. Alvenante al Beograd je la 1^a h., ni iris

al la plej granda nova parto de Beograd nomata Nova Beograd kie estas la Studenta Domo. Granda estis nia surprizo kiam suprenirante ŝtuparojn eliris malagrabla odoro. Ni malfermis nian ĉambron kaj la vidaĵo antaŭ ni aspektis terure. Neniam antaŭe ni povis imagi ke estus ĉambroj tiel malpuregaj. Ni ne malfermis la valizojn ĉar ne estis taŭga loko por lasi la vestaĵojn.

Tiu ĉi loko unu tago post nia alveno estis ege konata por la kongresanoj per la nomo " Porkejo". Ni dormis ĉi tie nur unu tago.

Mi opinias ke la prizorgantoj de la loĝiga servo devus pensi en taŭgaj ĉambroj por la partoprenantoj kontraŭe en la dosierujo devus enmeti malinfektaĵon. Kaj jen la ĉefa afero .

Mi havis eblecon koni Beograd dank'al la Internacia Lingvo. Dum ĉiu kongrestagoj ni vizitis la urbon kaj ĉirkaŭaĵojn kun du bulgaraj amikinoj esperantistinoj al kiuj mi ekkonis jam en Helsinki. Feliĉe ili komprenis Servo-kroatan lingvon kaj ĉe ili, ĉiom estis tre facile. Ni vizitis muzeojn, vendejojn kaj magazenojn, ni piediris sur la belega parko Kalemegdan kaj ekskursis al la monto Avala. Mi admiris la belecon de pluraj skulptaĵoj dislokigitaj inter la urbo. Ni ankoraŭ bongustis orientajn manĝaĵojn kaj vespermanĝis en la malnova kvartalo nomata Skadarlija = beograda Montrartr, aŭskultante malnovajn kantojn.

Tre interesa estis nia ekskurso al Novi Sad, ĉar la urbo aspektis tre pura kaj tute malsimila al Beograd. Finfine, ni estas kontentaj ĉar ni havis eblecon dum la Kongreso saluti geamikojn de alilandojn kaj longe paroli kun ili.

Estis por ni tre interesa la kono de Beograd kaj de la Jugoslava popolo.